

Okdek jaroj de esperanta vivo, 8-a parto
Ruiniĝo de Zamenhof
Claude Gacond, 186-a radioprelego, 1967.05.03 & 1967.05.06

Cl.- Atentu esperantistoj! Ĉi tie vi aŭdas la Svisan Kurtondan Radiostacion. Parolas gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond.

La decembra numero de *La Esperantisto* finiĝas en 1891 (4-a jaro de la esperanta erao) per teksto, kiun ni hodiaŭ entute legos, tiom ĝi akre atestas pri la malfacila financa situacio de Zamenhof.

A.- Vi sciuj, ke la okulisto estis sin tiom dediĉinta al esperanto, ke malsato regis en la familio. La redaktado de *La Esperantisto* estis la guto, kiu plenigis la vazon. La profesia kaj familia ruiniĝo efektiviĝis. Aŭdu, kion skribas Zamenhof anstataŭ bondeziro por la nova jaro :

Cl.- « *Kun la nuna numero mi devas por kelka tempo interrompi mian laboradon en nia afero. Ne el manko de bona volo, ne el laciĝo mi tion ĉi faras ; la afero estas al mi tro kara, por ke mi povu iam memvole forlasi ĝin eĉ por unu tago. Sed bedaŭrinde homo dependas de cirkonstancoj ; ekzistas cirkonstancoj, kontraŭ kiuj la plej bona volo povas batali nur ĝis certa limo, ĝis venas momento de absoluta neebleco. »*

A.- Nun Zamenhof avertas, ke esperantistoj respondis al lia alvoko pri financa helpo. Li provis vendi akciojn kaj fond-kartojn, kiujn li nomas « *Kartoj Fondantaj* ». Tiu financa bazo ne sufiĉis por garantii la eldonon de la presotaj libroj. Ĝi sin montros nerealigebla. Aŭdu la sekvon de la artikolo :

Cl.- « *Miaj projektoj en la numeroj 8 kaj 9 de nia gazeto trovis varman aprobon de miaj amikoj : mendoj por **Akcioj** kaj **Kartoj Fondantaj** venas kune kun kuraĝigaj amikaj leteroj. Ankoraŭ kelkaj monatoj – kaj eble la nombro estos plena kaj la regula irado de nia afero estos certigita. Sed la cirkonstancoj, longe per forto repelataj kaj retenataj, fariĝis fine tiel premantaj, ke mi pli atendi ne povas ; ili min tial devigas demeti de mi por kelka tempo la kondukadon kaj eĉ la simplan laboradon en nia afero, ĝis mia situacio ŝanĝiĝos kaj ĝis mi denove, kun duobligita energio, povos rekomenci la laboron en la afero, kiu estas la tuta celo de mia vivo.*

A.- Nia afero havas ja amikojn sufiĉe spertajn kaj sufiĉe laboremajn. Tial mi esperas, ke mia kelktempa foriĝo ne estos sentebla kaj alportos nenian malutilon al nia afero. Mi esperas, ke la amikoj energie daŭrigos la karan aferon, kiun ni kune komencis, kaj kiu pli aŭ malpli frue venkos, sendube venkos, se eĉ tiu aŭ alia aparta batalanto falos en la malfacila batalo.

Cl.- **Personoj** povas fali, se iliaj piedoj el viando kaj ostoj perdas la forton ; sed la ideo neniam falos, kaj kie falis unu batalanto, pli aŭ malpli frue sin trovos dek aliaj, pli fortaj kaj pli lertaj.

A.- Mi faris ĉion, kion mi povis, mi tenis min tiel longe, kiel mi povis, kaj nun mi devas foriĝi kaj peni refortigi miajn piedojn, kiuj rifuzas pli min porti. Pasos kelka tempo, miaj vundoj saniĝos, kaj tiam, amikoj, vi denove min vidos inter vi, en la vico de la plej energiaj batalantoj. Mi esperas, ke mia foresto ne longe daŭros.

Cl.- Dume mi daŭrigas kaj daŭrigos la akceptadon de subskriboj por **Kartoj Fondantaj** kaj petas la amikojn ne forgesi pri tio ĉi. Kiam la necesa nombro de la Kartoj estos atingita, tiam, se la amikoj ĝin trovos utila, mi povos mallongigi mian foreston kaj rekomenci mian laboron multe pli frue ol mi esperas.

A.- Pri la plua maniero de laborado la amikoj kaj la kluboj korespondados kaj konsiliĝados inter si. Nur unu peton mi havas al la amikoj : laboru en konsento kaj helpu unu al la alia.

Okdek jaroj de esperanta vivo, 8-a parto
Ruiniĝo de Zamenhof
Claude Gacond, 186-a radioprelego, 1967.05.03 & 1967.05.06

Cl.- *Se tio ĉi aŭ alia al vi ne plaĉos, ne kontentigu vin per simpla mallaŭdado (ĉar mallaŭdi aliajn estas tre facile), sed penu vi mem fari pli bone. La malbonaĵon elpuŝu ne per disputoj, sed per plibonaĵo.*

A.- *Al ĉiuj amikoj de nia afero mi sendas plej koran saluton.*

Cl.- *Post-skribo. Mi estos tre danka al la amikoj, se ili daŭrigados skribi al mi pri ĉio tuŝanta nian aferon kaj se ĉiuj nove venontaj amikoj de nia afero sendos al mi sian nomon kaj adreson ; sed oni ne ofendiĝu, se mi de mia flanko kredeble devos lasi la plej grandan parton de leteroj sen respondo. Kie ajn mi estos, mi petas ĉiam adresi la leterojn al Doktoro L. Zamenhof en Varsovio. » (Fino de la citaĵo.)*

A.- Oni povas imagi la konsternon en la esperantaj hejmoj, kiam *La Esperantisto* alportis tiun novaĵon. Multaj esperantistoj tiam ekkomprenis la gravecon de la situacio de Zamenhof. Se la pola kuracisto ne plu trovas la financon rimedon por vivteni sian familion, la tuta afero, kiu estas ankoraŭ tiom juna, nur kvarjara, pereos kun la zamenhofa familio.

Cl.- Tiam aperas mecena figuro. Germana termezuristo W. Trompeter skribas al la redaktoro de *La Esperantisto*. Li ofertas helpon, sed li ne volas, ke oni trompetu pri lia helpo.

A.- Jen lia ofero: Li prenas sur sin ĉiujn elspezojn de la gazeto por tri jaroj (1892, 93 kaj 94) kaj krome ofertas monatan pagon de cent markoj por la redaktora laboro. Li ankaŭ promesas financon helpon por aperigi kelkajn gravajn librojn.

Cl.- Zamenhof do povos repreni la redaktadon de *La Esperantisto*. En la artikolo, kiu anoncas la reaperadon li diras :

A.- « *Eĉ en la plej malfacilaj minutoj ni ne dubis je la estonteco de nia afero, ĉar la danĝeroj, kiuj ĝin minacis, havis karakteron nur pure financon. Nun tiu ĉi danĝero estas unu fojon por ĉiam forigita. Unu varma kaj oferema amiko de nia afero prenis sur sin la tutan financon flankon de nia gazeto kaj kovrados el sia poŝo ĉiujn perdojn ligitajn kun la eldonado. Dank'al tio ni havas nun antaŭ ni tute glatan vojon, ni staras forte kaj ekster ĉia danĝero. »*

Cl.- Sed aliaj danĝeroj minacas esperanton. La ĥoro de la reformemuloj muzikas ĉiam pli laŭte, kaj la solistoj kantas ĉiam pli konvinke siajn personajn preferojn :

A.- Esperanto ne progresas, ĥoras la rusoj, ĉar en ĝi ekzistas **artikolo**. Ni forigu la artikolon.

Cl.- Ne, respondas la francoj, la artikolo estas absolute necesa. Sed la **akuzativon** ni forĵetu. Ĝi estas la kaŭzo de la malrapida disvastiĝo de esperanto.

A.- Ne, intervenas la germanoj. La mankoj en esperanto estas fonetikaj. La sono **s** en komenco de vorto estas nepronebla. Ĝi fariĝu **z**. **Sumo** fariĝu **zumo**, kaj la lingvo venkos.

Cl.- Kaj la solistoj krias : mi deziras diri **ed** anstataŭ **kaj**.

A.- Ne, mi preferas **e**.

Cl.- Ne, la latina **et** estas pli bela.

A.- Ho, kia laciga muziko ! Kiam ĝi ĉesos ?

Cl.- Vi aŭdis prelegon el Svislando. Parolis Claude kaj Andrée Gacond. Ĝis reaŭdo !

-oOo-